


# Brazila Heroldo

Zamenhof Editores

Brazilio - Julio 1993

I Jarkolekto - N-ro 0



## Bunta evento en Goiânia

Esperantistoj kaj ne-esperantistoj travivis neforgeseblan festan nokton en Goiânia, okaze de la disdono de diplomoj al la kursfinintoj de la unua baza kurso por instruistoj, laŭ la natura metodo. La eventon organizis Kultura Esperanta Centro. Paĝo 07

## Verdaj Fantomoj

Svarmas fantomoj en Brazilo. Lastatempe aperadis amaso da ili, okaze de la afero Collor. Nun temas pri iuj tute sendanĝeraj, verdaj. Paĝo 05

## Zamenhof reprenos la agadon de Hachette

Kiel la fama franca eldonejo Hachette en fruaj jaroj de la kuranta jarcento, Zamenhof Editores provizos la brazilan libromerkaton per esperanto-libroj. Ĝis la fino de 1994, almenaŭ la plej grandaj librovendejoj en Brazilo havos esperanto-librojn en siaj stokoj. Paĝo 06

## FHC atakas la publikan deficiton

La ministro Fernando Henrique Cardoso decidis ataki la brazilan inflacion per rimedo neniam antaŭe provita: la batalado kontraŭ la publika deficino. Multaj ekonomistoj kaj civitanoj mezkulturaj opinias, ke la plej grava estiganto de nia inflacio estas la deficino publika, t. e., la registaro elspezas pli ol enspezas. Estas bazigite sur tiu atesto, ke FHC prezentis al la tuta nacio ekonomian agadplanon. Paĝo 03

## SUPLEMENTOJ

Valoros la penon aboni la ĵurnalon Brazila Heroldo eĉ se por ricevi nur ĝiajn du suplementojn:

### FACILA

Trimonata facillingva revuo por komencantoj. En ĝi aperos diverstemaj artikoloj, ludoj, facilaj ekzercoj kaj bildhistorietoj.

Riĉe ilustrita, Facila estos redaktita de Maria Hilarina Aires Nunes. Kunlaborantoj sin turnu al ŝi.

### PANORAMO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

Novembra kajero pri interlingvistiko kaj esperantologio, sub la redaktado de Gilson Villas Bôas Passos, Panoramo de Interlingvistiko kaj Esperantologio aperigos fakajn artikolojn, raportojn, intervjuojn kaj recenzojn pri fakaj libroj, inkluzive universitataj tezoj pri Esperanto.

Ne malhavebla eldonaĵo por seriozaj esperantistoj. Fakuloj sin anoncu al la redaktoro.

**FACILA KAJ PANORAMO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO NE ESTOS ABONEBLAJ APARTE.**

## Zagreba Metodo en Brazilo

La fama Zagreba Metodo, jam eldonita en pluraj lingvoj, nun haveblas portugallingve.

Por enkonduki ĝin en la movadon kaj asesori la instruistojn adoptintajn ĝin, Zamenhof Editores kreis la Klubon de la Uzantoj de Zagreba Metodo.

La tuta agado de la Klubo celas plialtigi la nivelon de la brazilaj instruistoj kaj kunlabori en la varbado de glerntantoj. Paĝo 06

# PROpono DE ĈIUTAGA ĴURNALO POR LA JARO 2050

"Kuras nun la jaro 2050. La vivo alprenis novan kaj pli veran perspektivon, pli ol 60 jaroj post la fino de la malvarma milito. Kvankam ankoraŭ ekzistas landoj pli riĉaj ol la laliaj, la absoluta mizero estis forbalaita de sur nia planedo.

Ĉiuj mondĉivitanoj havas almenaŭ bazan edukadon, senecepte. Oni ne plu mortas je malsato kaj al ĉiuj estas garantiata la akiro

de la bazaj vivbezonoj, kiuj permesas al ĉiuj sufiĉe komfortan vivon. Militoj estas nur forgesindaĵoj.

Brazilo nun estas lando moderna, avangarda eĉ, kiu finfine eniris la klubon de la disvolviĝintaj landoj.

La teknologio atingis sukcesojn neniam antaŭe imagitaj.

Sur la kampo de monda komunikado estas grava novaĵo: Esperanto estis agnoskita kiel dua

lingvo de ĉiuj popoloj kaj estas instruata denaske al ĉiuj infanoj, en ĉiuj landoj. Sekve de tio, ĝi furoras. Grandaj kaj tradiciaj eldonejoj adoptis ĝin kiel duan lingvon, la satelitoj elsendadas televidajn programojn en Esperanto ĉie ĉien, famaj ĵurnaloj kaj revuoj havas Esperantan eldonon. Multaj eldonejoj, pionire adoptintaj la internacian lingvon fariĝis grandaj multenaciaj entreprenoj.

En Brazilo pintas ĵurnalo pionira en la uzado de Esperanto por komuniki la ĉiutagajn de la nacia vivo, sub ĉiuj aspektoj: Brazilia Heroldo, de Zamenhof Editores.

Ĝi ampleksas 100 paĝojn je 5 diversaj kajeroj, krom la diversstemaj suplementoj, kiel la pioniraj FACILA kaj PANORAMO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO. La milionoj da legantoj de

Brazilia Heroldo troviĝas ne nur en Brazilo, sed ankaŭ kaj amase en la eksterlando, des pli ĉar Brazilo nun ludas multe pli gravan rolon en la internacia scenejo".

Ĉu revo de frenezulo? Ĉu utopio? Jes, ja. Revo kaj utopio. Tamen ĉi tiu estas en viaj manoj la numero unua de la freneza utopiaĵo.

Ni firme kredas, ke la grandaj revoj anticipas la grandajn realaĵojn. Ni atendu la jaron 2050.

## BH KAJ LA MOVADO

Delonge la brazilia esperantistaro revas pri ofta periodaĵo, kiu priheroldu la movadon, metu sub diskutadon niajn problemojn kaj ties eventualajn solvojn kaj publikigu opiniajn artikolojn de la senlacaj batalantoj kiuj ĉiutage strebas por esperanto.

La primovadaj paĝoj de Brazilia Heroldo certe bone plenumos tiun vakantan lokon, tamen ni nepre klarigu sub kia perspektivo: Brazilia Heroldo sin prezentos kiel sendependan voĉon, kaj tiel sentos sin devigita ne nur laŭdi la bonajn iniciatojn, sed ankaŭ kritiki kiam necese. Seriozaj movaduloj ne trovas niajn pordojn malfermitaj, dum fanfaronuloj ne meritis nian atenton.

Brazilia Esperanto Ligo, la lokaj, regionaj kaj fakaj asocioj ricevos de Brazilia Heroldo plenan apogon, sed ni ne rezignos montri mankojn, malfortaĵojn, gravajn stumblojn kaj blagojn.

La kritika sinteno kiun ni prenos rilate al la movado absolute ne signifas opozicion, sed sinceran deziron kunlabori por la evoluigo de nia afero, sen kaŝitaj intencoj.

Resume, Brazilia Heroldo naskiĝis por servi al la movado brazilia, kiu pintas kiel unu el la ĉefaj motoroj de la internacia movado.

Brazilia Heroldo estas tio: ne nur Brazilo en Esperanto, sed ankaŭ kaj ĉefe, Brazilo por Esperanto.

Brazilia Esperanto Ligo, la

*Fabricao Valle*

## LA TRI KOLUMNĴOJ DE LA NOVA MOVADO

Ĝis nun la esperanto-movado ĉefe karakteriziĝis per ĉiufanka amatoreco, kio per si mem ne estas malbonaĵo. Tamen ofte tiu amatoreco estis akompanata de malzorgemo, ne taŭgaj komunikiloj, manko de planado kaj aliaj bedaŭrindaj aferoj.

Nu, jam estas tempo alpreni novan sintenon, kongrua al la nuntempa etapo de nia movado. Kiel propono, mi prezentas tri kolumnojn sur kiuj la movado ekde nun estu bazita: AVANGARDA AMATORECO, EBLA DUONPROFESIECO kaj ĜISFUNDA PROFESIECO.

Jen iliaj ĝeneralaj trajtoj:

1- Avangarda amatoreco - Ĉiam ekzistis kaj ekzistos amatoroj en esperantujo - volontuloj kiuj sindoneme kaj senpage sin dediĉas kelkajn horojn semajne al esperanto. Sed ekde nun fariĝu neakcepteble ke tiuj volontuloj fuŝu. Amatoreco ne nepre devas esti sinonimo de malaltkvalita agado. La movado devas krei mekanismojn por utiligi la bonvolemon de tiuj volontuloj laŭ bona vojo (tasko de BEL). Oni ne plu eldonu mimeografitajn buletenojn kaj similaĵojn, ĉefe se la celo estas la neesperantista publiko; oni prizorgu pli bone niajn propagandilojn, afiŝojn kaj faldfoliojn; oni postulu de Brazilia Esperanto Ligo multefankan laborprogramon (BEL ne estas nur la stabo en Brasilia, ĝi estas ankaŭ ĉiuj asocioj kaj unuopoj, inkluzive vi, kara leganto); esperantistoj unue lernu esperanton antaŭ ol ĝin ekinstrui.

Finfine, avangarda amatoreco signifas "kvaliton", meti la improvizemom en la balaĵon.

2- Ebla duonprofesieco - Esperanto-asocioj pli firme starigitaj, kun forta strukturo, profesieco laŭeble kelkajn servojn. La instruado ne estu senpaga, la instruistoj estu salajrorajtaj, libroservo kaj vendado de esperantaĵoj estu gravaj enspezofontoj. En reĝimo de produktiva duonprofesieco, la estraranoj ne ricevas salajron, sed plentempaj laboristoj kaj instruistoj perlaboru sian monon.

3- Ĝisfunda Profesieco - Jen afero ne por neprofitcelaj asocioj, sed por privataj entreprenistoj, kiuj pretas investi monon kaj tempon en Esperantujo. La kampo de agado por tiuj entreprenistoj estas sufiĉe granda: instruado de esperanto (kaj eventuale de aliaj lingvoj), eldonado (opcie oni povas eldoni ankaŭ nacilingve, kiel Z.E.), turisma agentejo (ne "nur por esperantistoj" sed "ankaŭ por esperantistoj", fabrikado de ĉiuspecaj esperantaĵoj, importado kaj eksportado (ne estas malpermesate utiligi ankaŭ la anglan, se esperanto ne tute maturiĝis por tio), ktp. ktp.

Nu, tiuj tri kolumnoj donos al nia movado tre novajn perspektivojn, se ili vere estos firme starigitaj.

*Zamenhof Editores*

DIREKTORO  
Fabrício Rodrigues Valle

CENTRA OFICEJO  
Ed. Antônio Venâncio da Silva, sala 314  
70.395-900 Brasília - DF

FILO  
Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de la Esperanto-instruado  
Praça Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste  
74.110-090 Goiânia-GO  
Telefonnumero (062) 229 12 65

**BRAZILA HEROLDO**  
Brazilo en Esperanto

Socipolitika, ekonomia kaj kultura ĵurnalo de Zamenhof Editores. Aperas Monate.

ADMINISTRADO KAJ REDAKCIO  
Praça Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste  
74.119-090 Goiânia-GO  
Telefonnumero (062) 229 1265

DIREKTORO KAJ ELDONISTO  
Fabrício Rodrigues Valle

REDAKTORO  
f-ino Maria Hilarina Aires Nunes  
Rua Emílio Chaves 293  
58.046-150 João Pessoa-PB

KONSTANTAJ KUNLABORANTOJ  
Gilbert Ledon  
César Domeles Soares

SEKRETARIINO  
Herminia Bertoldo Moreira

VERKIS KAJ TRADUKIS POR ĈI TIU NUMERO  
Gilson Villas Boas Passos  
Ângela Moraes  
Carlos Lima Mello

FOTIS POR ĈI TIU NUMERO  
Siloê Evangelista Fernandes

SUPLEMENTOJ

FACILA  
Trimonata revuo por komencantoj.  
Aperigas facilajn artikolojn laŭ la vortolisto de la revuo KONTAKTO (Dumonata socikultura revuo de TEJO).  
Redaktoro: Maria Hilarina Aires Nunes

PANORAMO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

Jara kajero pri interlingvistiko kaj esperantologio. Aperigas fakajn artikolojn, raportojn kaj intervjuojn.  
Redaktoro: Gilson Villas Boas Passos  
Rua José Neves Cyreste 165, Ed. Régia Maris, apto. 301  
29.060 Vitória-ES

ANIAJ SUPLEMENTOJ NE ESTAS ABONEBLAJ APARTE

## HOMEOPATIO

La laboro de Instituto Lamasson estas limŝtono en la scienca agado por esperanto. La seriozeco kaj kompetenteco de D-ro Izao, Neuza Priscotin kaj aliuloj jam alportis konkretajn rezultatojn. En Ribeirão Preto, la homeopatoj kongrsontaj en la 54a Tutamerika Kongreso de Homeopatio prisdikutos ĉu esperanto estos adoptita kiel interlingvo de la latinamerikaj homeopatoj. La prestiĝo de Instituto Lamasson, kiu jam adoptis esperanton kaj organizos la kongreson, certe influos favore al la adopto. Se tio vere okazos, la ŝanco de la lingvo internacia esti pli serioze pritraktata ĉe aliaj sciencaj institucioj multe kreskos.

## INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

La Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio, okazonta oktobre en Goiânia, ankaŭ estos limŝtono por nia movado. Bedaŭrinde, magras la aliĝoj. La organizantoj - mi inter ili - esperas pli abundan rikolton ekde nun.

## GAZETARA SERVO

Ŝajne ne estas prioritato de BEL, sed ververe temas pri, laŭ informis min Francisco Matos, manko de monrimedoj kaj homfortoj. Ĝis kiam ni devos atendi, por havi tiun por ni prioritategan servon?

## BRAZILA HEROLDO

Kelkaj homoj - el tiuj kiuj antecipe estis informitaj pri la lanĉo de BH - vetas je la malsukceso de nia iniciato. Kaj preskaŭ certe ili ne abonos ĝin, timante forperdi la monon. Felice, ili estas minoritato. Por la plimulto, post sesjara iom silenta klopodado, Zamenhof Editores meritas fidon. Aŭ ne?

# ANONCI EN BRAZILA HEROLDO ESTAS PLI FACILE OL LERNI ESPERANTON.



Kontaktu nin.  
Tre malfacile vi decidis  
ne anonci en  
Brazila Heroldo.

*Zamenhof Editores*

(062) 229-1265

## FHC ATAKAS LA PUBLIKAN DEFICITON

En 1992, Brazilo registris inflacion de 1157% kaj tiel staris je la tria rango en la mondo, malantaŭ nur Zairio kaj Rusio. Post ses monatoj, Rusio sukcesis iom ekvibriliĝi kaj donis sian rangon al Brazilo, kiu fariĝis pli proksima de la domaĝa rekordo. Ek de la enooficiĝo de la nuna respublika prezidanto Itamar Franco, de malpli ol unu semestro, du ministroj de financaj aferoj estis senoficiĝitaj, Paulo Haddad kaj Eliseu Rezende. La tria ministro, Fernando Henrique Cardoso, fermis junion kun akumulita inflacio de 300%. En la du unuaj semajnoj kiam li enposteniĝis, la prezoj forŝetiĝis 15%. En nur 15 tagoj, la brazila inflacio atingas la jaran inflacion de Meksikio, Ĉilio kaj Bolivio. Kurante tiel rapide, ĝi atingas la jaran inflacion de Usono kaj Japanio dum nur 5 tagoj.

La brazila inflacio fariĝis neĝo-balono kun rezultoj ŝajne ne kontroleblaj, kalkulante elementojn kiuj eĉ timigas personojn kiuj vivas en stabilaj ekonomioj, ekzemple de la jenaj: De 1980 ĝis 1993, Brazilo havis kvar malegalajn monistemojn, kvin frostigojn de prezoj kaj salajroj, naŭ planojn de ekonomia stabileco, 11 indeksojn por inflaci-mezuro, 16 malsimilajn politikojn pri salajro, 21 proponojn pri pago de ekstera monŝuldo kaj 54 sanĝojn en la prezpolitiko. Laŭlonge tiu deklaro la akumulita inflacio atingas la stratosferan 146.219.946.300%.

Malgraŭ ke tiu situacio aspektas nekredbla al multaj personoj, brazilaj ekonomistoj kredas ke tiu realeco povas renversiĝi. Fine, al ĉi estas solvo. Lando kiel Germanio, punita de hiperinflacio dum la Dua Mondmilito, estas nuntempe gravega lando. Usono travivis profundan depresian periodon en la 30-aj jaroj kaj nun fariĝis la unua monda potenco.

Multaj ekonomistoj kaj civitanoj mezkulturaj opinias, ke la plej grava estiganto de nia inflacio estas la publika deficino, t.e., la registaro elspezas pli ol ricevas. Estas bazigite sur tiu atesto ke la nova ministro de financaj aferoj, Fernando Henrique Cardoso, lastatempe prezentis al la tuta nacio ekonomian agadplanon nomitan "Verplano", kiu prioritigas la reguligon de publikaj kontoj. Tiu plano komenciĝas per la "tranĉo" de US\$ 6 bilionoj de elspezoj de la federacia buĝeto por 1993, kiu samvaloras al 2,5% de US\$ 240 bilionoj elspezotaj de registaro ĝis la fino de ĉi tiu jaro. Tio ne sufiĉas, sed certe estos la komenco.

La "tranĉo" en la buĝeto estas nur unu el la eroj en tiu proceso de agustigo, kiun la registaro komencis fari. La aliaj elementoj estas kresko de enspezoj, batalo kontraŭ imposta ŝtelkaso, plia entreprenprivatigo, reguligo de la pago de ŝtataj kaj municipaj ŝuldoj kaj "sanigo" de ŝtataj bankoj. Pri tio, la ministro jam pagpostulas monon el la ŝtatestroj kaj urbestroj, kiuj ŝuldas US\$ 17,6 bilionoj al la federacia registaro.

En la batalo kontraŭ ŝtelkaso, la agadplano antaŭvidas pagpostulon de suplementa imposto al 18 mil individuoj, kiuj deklaris renton malpli grandan ol la vera rento de 1992. Ĝi ankaŭ pagpostulos ŝuldon de 11 mil individuoj, kiuj ne pagis rent-imposton sur valoroj deklaritaj lastjare. La Federacia Buroo pri Enspezo ("Receita Federal") ankaŭ oficiale sciigis 300 mil kontribuantojn, kiuj ne prezentis deklaracion pri rento en 1992. La Buroo kontrolois pli intense la 30.000 pli grandajn entreprenojn, kies fakturo estas super US\$ 150 mil monate, krom 600 aliaj kiuj pli ofte ŝtelkasis.

En la privatiga areo, la "Verplano" plirapidigos la vendon de malgrandaj partoprenoj de registaro en 600 entreprenoj, stimulos konkuradon kaj evitos la aperon de oligopoloj en privatigitaj sektoroj. La plano ankaŭ konkludos la privatigon en la sektoroj de siderurgio, benzenkernio kaj fekundigaj elementoj, kaj komencos vendi ŝtatajn entreprenojn, kiuj esploras elektrajn servojn kaj fervojan transportadon.

Aliaj drastaj decidoj estas aplikataj en la banka sektoro. Nun gvidantoj de ŝtataj bankoj, kiuj pruntedonas monon al ŝtataj kaj iliaj entreprenoj povos esti arestataj dum du aŭ ses jaroj. La ŝtataj bankoj ne povas pruntepreni monon aŭ ricevi monsumon krom la minimumaj limoj de kapitalo fiksitaj de Centra Banko, kiu nun havas la povon kontroli, interveni kaj likvidi federaciajn bankojn. En la postsigno de tiu agadplano, diversaj bankaj agentejoj fermiĝis pro la restrukturado de la federaciaj kaj ŝtataj bankoj. Lau la ministro Cardoso, tiu decido fariĝis necesa por pli bona administrado de neglantaj oficialaj moninstitucioj.

Rilate al partopreno de ŝtatoj kaj municipoj en tiu plano, la ministro determinis ke la federacia registaro interrompu la pago-garantion por eksteraj pruntadoj, la fermon de novaj konvencioj kaj la transdonon de federaciaj monsumoj al ŝtatoj kaj municipoj, kiuj ŝuldas al registaro, al ŝtataj entreprenoj kaj oficialaj bankoj. Tamen unu el la plej energiaj decidoj rilatas al la jura konduko destinata al ŝtatoj kaj municipoj, kiuj havas impostajn ŝuldojn por saldi al la "Trezo". Nun, tiuj du administraj sferoj estos jare traktataj same kiel la privata sektoro, kaj tiuj publikaj gvidantoj povos submetiĝi al juraj kaj krimaj enketoj, same kiel reprezentantoj de neregistaraj institucioj.

Malgraŭ havi la apogon de granda parto de la popolo, la "Verplano" eltrovas en la politikistoj iom da kontraŭstaro, tial ke tiu plano agnoskas ke registaro estas unu el la ĉefaj respondeculoj pri inflacio en nia lando, kaj politikistoj, finfine, estas tiu, kiu regas. Danke al la festivalo de monsumoj liberigitaj de registaro, ŝtatestroj, urbestroj, deputitoj, senatoroj kaj urbaj konsilantoj garantias la funkciadon de la malvirta balotmaŝino. Sed kiu gajnas el inflacio ne estas tiuj virspecoj. Multaj entreprenistoj, precipe tiuj bankmastroj, ankaŭ multe gajnas danke al diligenta monaplikado en financa merkato. Sed kiu perdas en la inflacio? La milionoj da civitanoj, kiuj gajnas mizerajn salajrojn kaj kiuj restas ĉiam borde de iu ajn ekonomia profito. Tiu situacio de malmultaj prenante sur sin avantaĝojn kaj multoblaj malfavorigoj, kreas malsanan societeton, ĉar se inflacio atingis ĉielon kaj mono restas aplikata en bankoj, oni ne investas en la kreado de laboro, lernejoj, transporto, loĝado, sano kaj kulturo al la popolo. Pro tio kreskas la eksterleĝeco kaj malriĉeco de nacio, el kies neevitebaj krimoj eĉ la riĉuloj ne fuĝas, kvamkam ili enkasteliĝas en siajn luksajn loĝejojn.

Brazilanoj estas lacaj de tiom suferi pro sia ekonomio subpremita de trompiĝoj kaj esperimentadoj. Tamen, estas ĉiam espero. Certe ne estas multo por fari se ne altrudi la respondecajn sektorojn plenumi siajn rolojn kaj sociajn kompromisojn, por ke ni kreu ke Brazilo reprenos sian vojon al plenkreskado.



Luz do Ar  
FLÁVIO FONSECA

# A MÚSICA QUE ESTÁ NO AR ESTÁ NO DISCO DE FLÁVIO FONSECA.

Luz do Ar é o novo LP do compositor Flávio Fonseca, com participação de Leila Pinheiro, Antônio Adolfo e orquestra. Traz uma faixa em Esperanto.

Preço: 13 UFIRs + 10% de despesas postais.  
Ankaj haveblas la versio AERLUMO, kasede.

**PIQUE·PEGA**

Caixa Postal 3.900  
70.084 970 - Brasília-DF  
(061) 273-9002

ARTE E PRODUÇÃO

## ĈU VI ESTAS LA AŬTORO KIUN NI SERĈAS?

Zamenhof Editores serĉas bonajn aŭtorojn. Jen la dezirataj originalaĵoj:

- BAZAJ LERNOLIBROJ DE ESPERANTO
- LERNO- KAJ LEGOLIBROJ POR INFANOJ
- VORTAROJ
- MALDIKAJ LEGOLIBROJ POR KOMENCANTOJ
- DAŬRIGAJ KURSOJ
- TRIVOLUMA KURSO DE ESPERANTO
- KONVERSACIA GVIDLIBRO
- SUPERAJ KURSOJ
- ESPERANTO POR TURISTOJ
- BROŜUROJ PRI SPECIFAJ GRAMATIKAĴOJ

Se vi havas originalaĵojn jam pretajn aŭ kompetentas por verkado aŭ kompilado, nepre kontaktu nin.

Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de la Esperanto-Instruado  
Praça Tamandaré, 830 - Sala 17- Setor Oeste  
74.110-090 Goiânia-GO Telefonnumero (062) 229 12 65

# ĈIUTAGA EKONOMI-SOCI-POLITIKO

Gilbert Ledon

## Bonvenon, "Brazila Heroldo"

"Ni, esperantista popolo diserigita en vastega portugallingva teritorio, kaj eble alie, vere bezonas vin se ni volas, ke tiu "dua"lingvo, kiu devus esti la unua, Esperanto, sukcesu atingi sian celon de kultura instrumento por la tuta mondo... por la paco!

Via naskigo per si mem estas bonaugura soci-politika evento, ec se oni rajtas dubi pri via viveblecoguste en ci tiu sama ekonomi-soci-politika situacio kie ni nun trovigas. Sed ni el la realo ne devas esti pesimismaj. Kaj estas tiom da mesaĝoj, kiujn vi kapablas heroldi por ke la homaj mensoj iel sukcesu modifi la trajektorion de la subevoluo, kiu bedaurinde nin regas!

Via apero dum nia 29a Brazilia Kongreso de Esperanto, en San Paulo ankau estas tre favora signo, car guste, ni el la organiza komitato celas ne nur diskonigi Esperanton sed cefe montre pruvi, ke ĝi estas tauga ilo por la ciutaga vivo, por scienca kaj teknika utiligado. Kaj jen, kara "Brazila Heroldo", tio ankau estas via celo en via sendependa agado de komunikilo per Esperanto. Vi fosu vian sulkon en la gazetaro de Esperantio. Vi meritas subtenon kaj apogon. Bonvenon!

## Kial "Ĉiutaga Ekonomi-Soci-Politiko"

"Kial ni elektis ĉi tiun rubrikon "Ĉiutaga ekonomi-soci-politiko"? Unue ĉar estas niaj punktoj de intereso, kiuj estas plene interligitaj en la funkciado de la homa socio. Due kaj konsekvence al tiu interligo ne eblas apartigi la homajn politikajn sintenojn de la pure sociaj kaj ekonomiaj. Kiel ni scias estas per la ekonomio, ke la homoj sukcesas akiri siajn vivbezonaĵojn, ĉu pere de rekta produktado, ĉu pere de distribuo de la riĉaĵoj. Estas tiuj procezoj, kiujn la homoj komplikis, kiuj ankau venigis la sociajn kaj politikajn problemojn.

Cetere ekonomi-soci-politiko estas multe pli ol la substanco de tiuj simplaj tri radikoj, ĉar absolute ĉio en la homa agado interligiĝas. Ekzemple se ni volas pritrakti la socian problemon de demografia eksplodo ni ne povas preterlasi la religiajn konceptojn. La ekonomiaj aktivecoj kondukas al poluado, al ekologiaj problemoj, kiuj siavice alportas reformuladon de etikaj kondutoj, kaj konsekvence sangiĝojn en la ĝenerala sekvenda politiko. La evoluo de produktado mem, kun la modernaj maŝinoj, robotoj, komputiloj kondukis al senlaboreco de la homoj, kun ree neceso de politika adapto, ktp. ktp.

La analizo de tiuj problemoj devas do okazi globe, mondscale. Ankau simpla, partia, supera decido per leĝoj aŭ filozofiaj diktatoj ne povas esti efikaj ĉar en la praktiko la teorioj estas aliaj, kiel oni popole diras. Ni scias, ke en politiko la uzo de partiecaj decidoj kondukas al favorado de homgrupoj je malprofito de aliaj homgrupoj. Supera instanco kiel ŝtato, bedaŭrinde ankau ne kontentige funkcias, kaj kondukas al nepotismoj kaj koruptado, kiel ni propraserte en Brazilo mem daŭre vidas. La fenomeno Collor ne estas escepto. Pli terure, la brazila konstitucio de 1988, kiun oni tiom pene proklamis permesas rektan intervenon de la ŝtato ĉe la individua iniciatado. Ni estas regataj de danĝera pseŭdo-marksismo "...kaj ni konas la rezultojn de 70 jara regado de pseŭdo-marksismo en la sovetia tiam bloko: absoluta ruinigo de la individua libero kaj iniciatado kun malabundo de bonkvalitaj varoj, mizero, konsekvenco de ĝenerala pigro, kiun la sistemo provokis eĉ se ĉiuj homoj ricevis edukon instruon kaj sanan prizorgon. Komunismo ne estas nur tio, karaj esperantistoj, kiuj amegas Kubon! La tiam laŭdita socialismo, en jaroj 1979, de Salvador Allende en Ĉilio kondukis al Pinochet...

Por la mildigo de la konfliktaj problemoj ŝajnas, ke la homoj devas sekvi specon de "ĉiutaga mem filozofio", tio estas memkonscio inter la propra konduto kaj la agoj individuaj kaj kolektivaj. Ni ne forgesu, ke la socio kun ĉiuj mankoj, rekte spegulas nin mem kiel individuoj. Tiu sama socio, laŭ la demokratiaj principoj, neniel povas konstruiĝi de la supro al la malsupro sed nur de la malsupro al la supro pere de konscia edifado de la individuoj mem. Tipa ekzemplo estas la nuna problemo. Nu, karaj legantoj, nenia supera institucio, ŝtato, kapablas tion fari; neniam en la homa historio, de jarmiloj, kiu ajn ŝtato tion faris.

Pere de la propra forto de l'vivo, la homo, kiel ĉiuj pliaj vivantoj, ricevis tiun naturan kapablon de agado por postvivado, ĉi tie kuzas la solvo... Aliflanke la konsciaj homoj scias, ke ĝuste la feŭda ŝtato kaj pliaj kolektivaj institucioj de la socio malhelpas per ĉiuspecaj ekspuiatado-formoj, ke la individuoj uzu en sia vivfonto siajn kapablojn por sia propra vivtenado. Sed kiel tion montri se ne per realaj faktoj el nia hipokrita sociordo, se ne per ĉiutaga (aŭ ĉiumonata) taksado de la faktoj kiuj aperas en nia ĉiutaga vivado?

Por reveni al nia "kara Brazilo", ĉu ni povas fidi, kredi je la nuna ĝuste "pseŭdo-marksisma registaro?... eĉ kun Itamar, F.H.C, Britto, Barelli,... ha! Lula kaj multaj aliaj! La fakto estas ke la ŝvelado de la ŝtatarato, kun konsekvenco detrua inflacio, dum ni restas kiel sklavoj de la ŝtata feŭdo kun Pampa Respubliko aŭ ne, ne povas elmontri favoran perspektivon por nia tuja estonteco. La estonteco ne plu apartenas al ni, sed al la forigenda feŭdo.

Estas en ĉi tiu spirito, en ĉi tiu prismo, ke la kolumnoj de tiu rubriko "Ĉiutaga ekonomi-Soci-Politiko en Brazila Heroldo pretendas prezenti al vi la faktojn, kiujn nia ĉiutaga sociopolitika vivo donas.

## SEN MISTERO

### KIO ESTAS ARTERIA TENSIŬ KAJ KIAL ĜI ESTAS MEZURATA?

Érica da Silva Silvério, 17a jaraĝa, studentino

La arteria tensio estas la nivelo de la "forto", kiun la koro kaj la arterioj faras por "puŝi" la sangon, t.e. por teni ĝin cirkulantan tra la reto de la sangaj vejnoj de la tuta organismo. la nivelo de tiu tensio estas mezurata en du momentoj, samvaloraj al la maksimuma kaj minimuma gradoj en kiuj ĝi estas praktikata. En la maksimuma nivelo, la sistola tensio ekivalentas la momenton kiam la koro "batas", t.e. kontrahigas por puŝi la sangon de la maldekstra ventriko al la aorto. La mezuro de la diastola tensio indikas la momenton kiam la koro ripozas inter du pulsatoj. La mezuroj de tensio estas gravaj indikatoj de la sanstato kaj eĉ povas, per si mem, montri precizajn simptomojn de iuj malsanoj se ĝia nivelo estos anormale alta aŭ malalta. Alta sistola tensio povas indiki, ekzemple, ke la arterioj perdis la elastecon, aŭ hipertiroidimon aŭ montri aneurismon.



# ANUNCIAR NO BRAZILA HEROLDO É MAIS FÁCIL QUE APRENDER ESPERANTO.



Ligue e confira.  
Vai ser difícil você  
não fazer um anúncio  
no Brazila Heroldo.

**Zamenhof Editores**

(062) 229-1265

## VERDAJ FANTOMOJ

Laŭ iu listo de Brazila Esperanto Ligo, ekzistas en Brazilo 119 organizaĵoj laborantaj por Esperanto. Tamen ni havas motivojn por kredi ke pli ol duono tute neaktivis, tio estas, ili ne organizas kursojn, ne varbas novajn membrojn por BEL, ne kunvenigas la lokan esperantistaron, ne disvastigas Esperanton, ne havas estraron kaj eĉ ne respondas leterojn. Resume, ili estas verdaj fantomoj. Estas vere, ke en la listo troviĝas kelkaj tre konataj asocioj, kiel SanPaŭlo Esperanto Asocio, kiu organizas la ĉi-jaran kongreson de Esperanto. Nu, se la 119 asocioj listigitaj de BEL estus aktivaj, Brazilo estus senkonkurence la plej granda potenco en Esperantujo. Ni atendu la tempopason por scii kiu estas kiu el la sekva


listo: Academia de Cultura Princesa do Cariri/Departamento de Esperanto (Camalau-PB), Acesita Esperanto-Klubo (Acesita-MG), Acrea Esperanto-Asocio (Rio Branco-AC), Alagoana Esperanto-Asocio (Maceio-AL), Alagoinhas Esperanto-Klubo (Alagoinhas-BA), Anápolis Esperanto-Klubo (Anápolis-GO), Associação Bahiana de Esperanto (Salvador-BA), Associação Brasileira de Cursos e Didática do Esperanto (Oinda-PE), Associação Brasileira de Esperanto (Brasília-DF), Associação Cearense de Esperanto (Fortaleza-CE), Associação Esperantista do Rio de Janeiro (Rio de Janeiro-RJ), Associação Esperantista Nosso Lar (Rio de Janeiro-RJ), Associação Mogiana de Esperanto (Mogi das Cruzes-SP), Associação Paulista de Esperanto (São Paulo-SP), Associação Pernambucana de Esperanto (Recife-PE), Avangarda Esperanto-Grupo (Atibaia-SP), Belorizonta Esperanto-Asocio (Belo Horizonte-MG), Brazila Esperantista Junulara Organizo (São Paulo-SP), Campos Esperanto-Klubo (Campos-RJ), Cassinu Esperanto-Grupo (São Gonçalo-RJ), Centralina Esperanto-Klubo (Centralina-MG), Clube de Esperanto de Joinville-SC, Clube Esperantista de Juiz de Fora (Juiz de Fora-MG), Disvastiga Esperanto-Grupo (Belo Horizonte-MG), Esperanta Grupo Adolfo Bezerra de Menezes (São Paulo-SP), Esperanta Grupo Adolfo Bezerra de Menezes (Guarulhos-SP), Esperanta Klubo Bezerra de Menezes (São Paulo-SP), Esperanta Klubo Zamenhof (São Paulo-SP), Esperanta Studgrupo Zamenhof (Salvador-BA), Esperantista Amikaro João Batista Aniceto (Serena-ES), Esperantista Asocio de Santa Catarina (Florianópolis-SC), Esperantista Rondo Divinópolis (Divinópolis-MG), Esperantista Societo de Pelotas (Pelotas-RS), Esperantista Societo São Leopoldo (São Leopoldo-RS), Esperanto-Asocio Campinas Grande (Campina Grande-PB), Esperanto-Asocio de Nova Iguaçu (Nova Iguaçu-RJ), Esperanto-Grupo Abel Gomes (Nova Iguaçu-RJ), Esperanto-Grupo Adolfo Bezerra de Menezes (São Paulo-SP), Esperanto-Grupo Klara Silbernig (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto-Grupo de Indaiatuba (Indaiatuba-SP), Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto Grupo Pachoro (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto-Grupo Paco kaj Frateco (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto-Klubo 3 de Outubro (São Paulo-SP), Esperanto-Klubo de Avandava (Avandava-SP), Esperanto-Klubo de Montes Claros (Montes Claros-MG), Esperanto Klubo de Pirajui (Pirajui-SP), Esperanto-Klubo de Rio Claro (Rio Claro-SP), Esperanto-Klubo de São Carlos (São Carlos-SP), Esperanto-Klubo João Ernesto (Ubatuba-MG), Esperanto-Klubo Porto Carreiro Neto (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto Klubo Waldemar Antonio Mendes (Patos de Minas), Esperanto-Klubo Zamenhof (São Miguel Paulista-SP), Esperanto-Rondo Bezerra de Menezes (Rio de Janeiro-RJ), Esperanto Societo de Porto Alegre (Porto Alegre-RS), Esperanto Societo de Rio Grande (Rio Grande-RS), Esperanto Societo de Santa Maria (Santa Maria-RS), Federacio Matogrosa de Esperanto kaj Lingvistiko (Cuiabá-MT), Franca Esperanto-Klubo (Franca-SP), Gama Esperanto-Klubo (Brasília-DF), Gardeno Esperantista Zamenhof (Franca-SP), Gaúca Esperanto-Asocio (Porto Alegre-RS), Governador Valadares Esperanto-Klubo (Governador Valadares-MG), Grupo de Esperanto Milda Lumo (Uberlândia-MG), Grupo Esperantista de Ilhéus (Ilhéus-BA), Harmonio Esperanto-Grupo (Andradina-SP), Ilhéus Esperanta-Grupo (Ilhéus-BA), Infana Esperanta Grupo (Boa Vista-PR), Instituto Brasileiro de Esperanto (São Paulo-SP), Instituto Esperanto de Educação (Belo Horizonte-MG), Instituto Goiano de Esperanto (Goiânia-GO), Instituto Piauiense de Esperanto (Teresina-PI), Ipatinga Esperanto Frateco Grupo (Ipatinga-MG), Iporá Esperanto-Klubo (Iporá-GO), Itabuna Esperanto-Asocio (Itabuna-BA), Itapuranga Esperanto-Klubo (Itapuranga-PB), João Pessoa Esperanto-Klubo (João Pessoa-PB), Kapišaba Esperanto-Klubo (Vitória-ES), Klubo Esperantista Zamenhof (Belém-PA), Kultura Centro de Esperanto (Campinas-SP), Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Rio de Janeiro-RJ), Liga Esperantista de Uberaba (Uberaba-MG), Liga Iguaçuana de Esperanto (Niterói-RJ), Lins Esperanto-Societo (Lins-SP), Lorena Esperanto-Klubo (Lorena-SP), Martha Signer Esperanto-Grupeto (Governador Valadares-MG), Nekonata Grupo por la Paco (Rio de Janeiro-RJ), Niterói Esperanto Klubo (Niterói-RJ), Paraná Esperanto-Asocio (Curitiba-PR), Patos Esperanto-Societo (Patos de Minas-MG), Pedro Leopoldo Esperanto-Klubo (Pedro Leopoldo-MG), Petropola Esperanto-Klubo (Petrópolis-RJ), Pinarbara Esperanto-Grupo (Espírito Santo do Pinhal-SP), Pocinhos Esperanto-Klubo (Pocinhos-PB), Potiguara Esperanto-Asocio (Natal-RN), Presidente Figueiredo Esperanto-Asocio (presidente Figueiredo-AM), Promissão Esperanto-Asocio (Promissão-SP), Ribeirão Preto Esperanto-Klubo (Ribeirão Preto-SP), Rondonópolis Esperanto-Asocio (Rondonópolis-MT), Rorajma Esperanto Asocio (Boa Vista-RR), Salto Esperanto-Klubo (Salto-SP), San Karlo Esperanto-Klubo (São Carlos-SP), Santana Esperanto-Grupo (Santana do Araguaia-PA), Santarém Esperanto-Asocio (Santarém-PA), Sociedade Bauruense de Esperanto-SP, Sociedade Esperanto Mato Grosso do Sul (Campo Grande-MS), Sociedade Mineira de Esperanto (Belo Horizonte-MG), Societo Esperanto de Salvador (Salvador-BA), Sonserpenta Esperanto Asocio (Cascavel-PR), Sorokaba Esperanto-Klubo (Sorocaba-SP), Stelo Esperanto-Klubo (Franca-SP), Tapirai Esperanto-Klubo (Tapirai-SP), Taubaté Esperanto-Asocio (Taubaté-SP), Uberlândia Esperanto-Klubo (Uberlândia-MG), Uniaĵo Divinista de Esperanto (São Paulo-SP), Verda Homaro Esperanto-Klubo (Acesita-MG), Volta Redonda Esperanto-Klubo (Volta Redonda-RJ).

## SKANDALA EKZEMPLO

La prezidanto de Fondaĵo Osvaldo Cruz, Carlos M. d'Almeida Morel, plendas pri la dependeco de Brazilo sur la kampo de la serĉado je sano. Li citas ekzemplon, ke la registaro ĉesas investi, pretekstante mankon de mono, sed fine elspezas pli en la importo de medikamentoj. En 1985, diras Morel, la Fondaĵo proponis al la registaro la konstruaĵon de industrio je US\$ 30 milionoj, destinitaj al la disvolvigo kaj al produktado de vakcinoj kaj al la formado de homrimedoj. Pro ĉiuj sangoj de ministroj la programo estis metita sur duan planon en 1987 ĉar la kostoj estis konsiderataj ekscasaj. Kaj ironie, en 1991, en unu sola importado de kubaj vakcinoj kontraŭ la meningito B, Brazilo elspezis astronomian sumon je US\$ 100 milionoj.

Novajagentejo IPSIS LITTERIS. Esperantigita de Gilson Villas Bôas.

# PIQUE PEGA



## CRIANÇA NÃO É BOBA.

Pique-Pega é um K7 com 22 músicas infantis para se ouvir na escola, em casa ou nas festinhas, com a qualidade que as crianças merecem. Compostas pela professora e psicóloga Marília Pinheiro, com arranjos e direção

musical de Flávio Fonseca.  
Preço: 13 UFIRs + 10% de despesas postais.  
Desconto de 30% a partir de 10 unidades.

**Fazemos shows musicais infantis em clubes, aniversários etc.  
Dê música de presente!  
Compomos sob encomenda.**

PIQUE-PEGA

Caixa Postal 3.900  
70024 970 Brasília-DF  
(061) 273-9002

## Zagreba Metodo en Brazilo

### ADOPTU LA METODON KAJ ALIĜU AL LA KLUBO

La adoptintoj de Zagreba Metodo gajnis klubon, nome, Klubo de la Uzantoj de Zagreba Metodo, kiu prizorgos la trejnadon kaj perfektigadon de ĉiuj instruistoj uzantaj ĝin. La klubo provizos siajn membrojn per la jenaj servoj:

1- Publikaĵo de la rubriko "Zagreba Metodo en Brazilo", en la ĵurnalo Brazilia Heroldo; 2- Organizado de seminarioj kaj kursoj pri instruado laŭ ZM, kadre de la programo de la ĵus fondita Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de la Esperanto Instruado; 3- Asesori la agadon de la instruistoj; 4- Pruntedoni videobendojn pri la metodo (Ĉi tio dependos de kontaktoj kiujn faras Zamenhof Editores kun la eldonistoj de la videobendoj); 5- Proponi kulturajn konkursojn inter la gelernantoj; 6- Liveri diplomojn rekonitajn de Internacia Kultura Servo (Zagreb/Kroatio); 7- Aljuĝi premiojn al la plej bonaj kursfinintoj.

Se vi estas instruisto de esperanto kaj jam decidis adopti Zagreban Metodon, ni gratulas vin. Se vi ankoraŭ ne konas nian metodon, tuj akiru ĝin ĉe Zamenhof Editores (Praça Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste - 74110-090 Goiânia-GO) au ĉe la libroservo de Brazilia Esperanto Ligo (Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília-DF).

#### ERARUMO

Bedaŭrinde la unua eldono de ZM enhavas preserarojn. Zamenhof Editores senlace laboras por organizi profesionan strukturon por reviziado de originalaĵoj. Certe en la dua eldono de tiu metodo ni ne trovas la malestimindajn koboldojn. Erarumo akompanas la unua eldono, kiel provizora solvo. Ni pardonpetas.

#### LETEROJ

Ĉi tiu rubriko estas je via dispono. La temon vi jam scias: ZAGREBA METODO. Demandoj, proponoj, kritikoj kaj informoj estas bonvenaj. Skribu al nia redakcia adreso, en Goiânia.

## ZAMENHOF PER BRASILIVROS

Ekde majo la libro "Direito Penal e Direito de Execução Penal", de Licínio Barbosa eldonita de Zamenhof Editores, estas distribuata tra la tuta lando per Brasilivros, el São Paulo, kiu estas unu el la plej grandaj distribuantoj de juraj libroj en Brazilo. Por la distribuado de alispecaj libroj, Zamenhof Editores serĉas aliajn distribuantojn, inkluzive por esperanto-libroj.

Laŭ la eldonisto Fabricio Valle, la enkonduko de Esperanto en la librovendejojn okazos laŭ la tri sekvaj paŝoj: 1- Plifortigo de la aktuala strukturo de la eldonejo; 2- Lanĉo de kampanjo por popularigo de legado en Esperanto; 3- Varbado de la librovendistoj.

#### HACHETTE

La laboro kiun planas plenumi Zamenhof Editores estis inspirita de la franca eldonejo Hachette, kiu en la unuaj jaroj de la kuranta jarcento vigle provizis la bromerkaton per esperanto-eldonaĵoj. Tiam, preskaŭ ĉiuj libro-vendejoj en Brazilo havis Hachette-esperantaĵojn en siaj stokoj. Tio estis la ĉefa motivo de la vigligo de la tiutempa brazila esperanto-movado. "Espereble ĝis la fino de la jaro 1994 nia eldonejo estos provizanta almenaŭ la plej bonajn librovendejojn per lernolibroj, legolibroj kaj vortaroj", konkludas la direktoro de Zamenhof Editores.

### ATOM BOMBO

Brazilo havas la atombombon, laŭ la franca revuo Paris-Match, kiu publikigis la liston de la ĉefaj nukleaj potencoj, dividante ilin en tri kategoriojn. En la unua estas la landoj kiuj subskribis TNPon - Traktato Pri Ne Proliferado -, kiuj estas konsiderataj la oficialaj. La dua kategorio estas tiu de la landoj, kiuj ne subskribis la Traktaton, sed kiuj havas

la regadon de la teknologio kaj neniam kaŝis tion. Kaj fine en la tria kategorio estas la landoj kiuj ne subskribis TNPon kaj krome kaŝas informojn pri sia kapableco konstrui la atombombon. Kaj en tiu listo estas Brazilo.

Novaĵagentejo IPSIS LITTERIS.  
Esperantigita de Gilson Villas Boas.

#### ESPERANTO-ASOCIOJ

### ESPERANTA KLUBO ZAMENHOF (San Paulo-SP)

Fondita je la 25a de januaro 1949, Esperanta Klubo Zamenhof estas unu el la plej antikvaj en nia lando. La iniciatintoj, sub la gvidado de Osvaldo Pires de Holanda frue monis sin kapablaj je tre fruktodona laboro: Krom organizi kursojn kaj disvastigi Esperanton en la kvartalo São Miguel Paulista, kie estas la sidejo de la klubo, ili entreprenis la eldonadon de Esperanto-bulteno, dum 5 jaroj. Poste, anstataŭis la bultenon Esperanta Revuo, kies unua numero aperis en aŭgusto 1953 kaj la lasta (la 7a) en januaro-februaro 1954.

La eldonado de la revuo ĉesis, sed ne la agado de la asocio, kiu seninterrompe organizas kursojn ĝis nun. Alia grava atingo de la asocio estis la konstruado de 250 kvadratmetra propra sidejo kiu estis konstruita per volontulaj laborbrigadoj de esperantistoj kaj simpatiantoj.

En la brazilaj kongresoj kaj seminarioj de esperanto, Esperanta Klubo Zamenhof neniam estis ne reprezentata, eĉ se per nur unu homo.

En 1981, en UK okazinta en Brazilio, la klubo estis reprezentata de 16 membroj kaj unu ensemble.

En la daŭro de sia ekzistado la klubo enskribigis 1067 pagintajn membrojn kaj instruis esperanton al miloj da interesatoj. Inter ili la plej aktivaj gvidantoj, laŭlonge ĝia historia, oni povas citi Darcy Mendonça, Darcy Gaya, Oscar Barros, Maria Margarida Barros, Maria Rita Barros, Dácio Martins Coelho, Antônio Cardoso de Sena, Antonia Radica, Sergio de Jesus Lopes kaj Osvaldo Pires de Holanda, kiuj neniam forlasis la klubon.

La aktuala estraro konsistas el la jenaj aktivuloj: Prof. Antonio Cardoso de Sena, Prezidanto; Dr. Osvaldo Pires de Holanda, Vic-prezidanto; Joel Afonso Francisco, Sekretario; José Martins Coelho, Kasisto; Maria Delza Macabu Jesus, Direktorino pri Socialaj Aferoj; Prof. Genildo Martins Coelho, Ezequiel de Oliveira kaj Jesus de Moura Alves, Konsilantoj.

La sidejo de Esperanta Klubo Zamenhof situas je la Strato Idiomo Esperanto n-ro 363, São Miguel Paulista, São Paulo-SP. Kurvenoj okazas ĉiudimance je la 10a horo.

UNIKA

AVANGARDA

ENHAVORIĈA

POR SERIOZAJ ESPERANTISTOJ

## 1a BRAZILA KONGRESO DE INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

Goiânia, de la 9a ĝis la 11a de oktobro 1993

KONFERENCISTOJ: José Passini, Rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fora; Leopoldo Knoedt, Tradukisto kaj Akademiano; Geraldo Mattos, Titola Profesoro pri Portugala Lingvo kaj Akademiano; Sylla Chaves, Profesoro pri Komunikado kaj Akademiano.

#### TEMOJ

ESPERANTO: NOVA ORDO EN LA INTERNACIA KOMUNIKADO  
LA UNIVERSALA LITERATURO EN ESPERANTO  
METODIKO KAJ DIDAKTIKO DE LA ESPERANTO INSTRUADO  
INTERLINGVISTIKO - FUNDAMENTOJ KAJ PERSPEKTIVOJ  
LA ESPERANTA TRADUKARTO

LA LINGVA PROBLEMO, LA HOMAJ RAJTOJ KAJ LA NACIA SUVERENECO

Pliajn informojn ĉe

ZAMENHOF EDITORES

Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de la Esperanto-Instruado

Praça Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste

74.110-090 Goiânia-GO

Telefonnumero (062)229 1265

APOGO: Brazilia Esperanto Ligo

# ALIAJ IDIOMOJ OMAĜAS ESPERANTON



Álvaro Luiz (Blua Sfero) jam fariĝis tradicia kantisto

Foto Silóé



Júlio César prezentis hispane varman kanzonon

Foto Silóé

## Elias Rassi apogas Esperanton



Foto Ellifaz Rodrigues

La urba konsilanto Elias Rassi Neto aŭtoro de la leĝo kiu enkondukis Esperanton en la municipajn lernejojn, ĉeestis la eventon de Kultura Esperanta Centro por ricevi specialan omaĝon.

Elias Rassi informis ke la sekretariino pri edukado de Goiânia, Mindé Menezes, atente observas la unuajn pasojn cele al la plenumado de la leĝo, ĉar Esperanto estas novaĵo por la plimulto el la instruistoj kaj gelernantoj de la municipaj lernejoj, kaj ilia reago al la internacia lingvo alportos signojn pri la plej bona maniero pritrakti la aferon.

Por la urba konsilanto, la perspektivoj estas la plej bonaj. "La adopto de Esperanto devas esti neproĝo por ĉiuj lernejoj, tra la tuta lando. Ĝi ja estas serioza alternativo por la internacia komunikado, kaj certe ĝi estos agnoskita", deklaris Elias Rassi al Brazila Heroldo.

## PUPTEATRO

La plej ŝatata prezentado en la evento de KEC, ĉefe de la infanoj, estis nek la deklamado, nek la skeĉo, nek la kantado.

Nu, gebufoj kaj aliaj tre interesaj pupoj estis la grandaj steloj de la festa nokto en Goiânia. La bufo devis lerni diri en Esperanto, laŭ postulo de la bufino, "Eu amo você, minha querida" (Mi amas vin, karulino mia), por definitive konkeri ŝian koron. Sed, kie lerni tion? Post longa serĉado, la bufo sukcesis trovi instruiston de esperanto kaj... jen la gvidlinio de la pupteatra noveleto. Mil ĝojaj sentoj vibris tra l'koroj de la ceestantoj.

La reĝisoro de la trupo - Grupo de Teatro de Bonecos Bem Bolado -, David Segurado Cabral, pretas fari prezentadojn tra la tuta lando, kontraŭ pago.

Pliajn informojn per la telefonnumero (062) 225 6313.

**S**enekzemplan eventon organizis Kultura Esperanta Centro, okaze de la disdono de diplomoj al ĉiuj instruistoj finintaj la bazan kurson pri didaktiko de Esperanto, laŭ la natura metodo, gvidita de Carlos Lima Mello.

La evento okazis la pasintan 19an de junio, en la Muzeo Pri Arto de Goiânia, kaj karakteriziĝis per bunta programo, enhavanta prezentadon de poemoj kaj kanzonoj en pluraj lingvoj.

Profesorino Rositela de Oliveira, reprezentanto de Franca Alianco, deklamis "La Poete", de Victor Hugo; la rokgrupo Guitar Voice prezentis la muzikon One, de la angla U2; Júlio César kantis en la hispana Nuestro Juramento, de Bienvenido Granda.

En la portugala lingvo estis prezentitaj la muzikoj Maneiras, de Zeca Pagodinho, kaj A Vida Se Promete Mais, de Grupo Raça. Ambaŭ muzikojn prezentis la grupon Esbanjo Samba.

Ne mankis kulturaj manifestiĝoj en Esperanto: La grupo Esperarte

prezentis la skeĉon La Valora Penraĵo, de Bertram Potts, kaj la muzikojn La Karesulo, de Pixinguinha, kaj Suno Mia, de Elvis Presley.

Kanto de Ekzilo, la fama poemo de Gonçalves Dias, estis deklamita de Maria da Luz.

La vigla junulara sekcio de Kultura Esperanta Centro bria partoprenis per la muzikoj Mia Ununura Amor (Carlos Roberto kaj Juliana), Dancu, Dancu Manuela (Carlos Roberto), Simpla Preĝo (Juliana) kaj La Nokto (Rodrigo).

Fine la ensemblo Blua Sfero oferis al la ĉeestanta publiko la muzikojn Mi Laboras en Fervojo kaj Zam.

Ĉiuj prezentaĵoj estis entuziame aplauditaj de la ĉeestantaro, kiuj ne ŝparis gratulojn al la artistoj kaj organizantoj de la evento.

La direktoro de KEC, Dilmá Cavalcante Bandeira, informis al Brazila Heroldo, ke pro la granda sukceso de la evento, ili planas organizi en la venonta jaro multlingvan festivalon.

## Lernoĉambro

SENDEPENDA ORGANO DE LA BRAZILAJ INSTRUISTOJ

### Nukleo de Metodiko kaj Didaktiko de Esperanto-Instruado

Lernoĉambro estas rubriko pri la instruado de Esperanto. Ĝi aperigos novaĵojn, recenzojn pri lernolibroj, informojn pri lernejoj eksperimentoj, pritraktos specifajn problemojn de la esperanto-instruado, publikigos statistikojn pri la instruado de Esperanto en Brazilo, fakajn artikolojn kaj intervjuojn. La redaktado de LERNOĈAMBRO okazos sub la respondeco de NUKLEO DE METODIKO KAJ DIDAKTIKO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO (Praça Tamandaré, 830 - Sala 17 - Setor Oeste - 74110-090 Goiânia-GO).

La brazilaj instruistoj de Esperanto kaptu la okazon por fari el Lernoĉambro sian heroldon, sendepende de la adoptita metodo.

### NUKLEO DE METODIKO KAJ DIDAKTIKO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

Ĉi tiu faka departemento de Zamenhof Editores esperas ricevi amasan aliĝon de la brazilaj e-instruistoj. La aliĝo estas senpaga kaj la avantaĝoj konsiderindaj. Interesatoj sin turnu al ĝia sidejo en Goiânia. Atentu, ke nur aktivaj instruistoj rajtos aliĝi.

### NATURA METODO DE ESPERANTO

Carlos Lima Mello

Antaŭ multaj jaroj, en 1965, kiam mi estis invitita de Esperanto-kurso de la Federacia Universitato de Ceará kunlabori kiel instruisto tie, ekburĝonis Natura Metodo de Esperanto.

Dezirante helpi la disvastigadon de la lingvo per rapidaj kursoj en aliaj urboj de Nordoriento, mi verkis broŝuron kun la titolo "Você Sabe Esperanto?". Ne nur mi persone utiligis ĝin, sed kelkaj instruistoj el aliaj urboj provis kaj pruvigis, ke ĝi estas efika.

Unu el ili estas profesoro Valdemir Moreira, kiu gvidis multege da kursoj tra San Paulo kaj Goiás, kun granda sukceso (pli ol 70% el la gelernantoj finas la kurson).

Kial natura metodo? Vizitante kongresojn mi konstatis, ke la esperantistoj ofte

forkuras de la konversacio, ĉar ili ne sentas, ke la lingvo fluas. Kial tio okazas? Mi opinias, ke la kaŭzo estas klara. Oni instruas la grammatikon, sen paroligi la gelernantojn.

Natura Metodo proponas unue paroligi la lernanton, due, ke li legu la lingvon kaj nur poste, ke li skribu ĝuste en Esperanto. Por atingi tiun celon ĝi konsistas el dudek lecionoj. En la dek unuaj oni instruas nur la 300 plej oftajn radikojn en struktura prezentado de paŝo post paŝo, en ordo de malfacileco.

En tiu momento de la kurso la instruisto celas nur paroligi la lernantojn. Oni evitas ĉiam kiam eble la uzadon de la nacia lingvo.

La kvin sinsekvaj lecionoj lecionoj instruas pliajn 200 radikojn, kaj ili celas la legadon de temoj pri la ĉiutaga vivo.

### NATURA METODO SURVOJE

La delonge konata esperantisto Carlos Lima Mello transdonis la originalaĵojn de sia lernolibro laŭ la natura metodo al Zamenhof Editores, por editorado. Tio okazis tuj post seminario gvidata de li ĉe Kultura Esperanta Centro, kiam la instruistoj de tiu institucio el Goiânia ricevis bazan trejnadon por la aplikado de la metodo. Cetere, Kultura Esperanta Centro, sub la gvidado de Dilmá Cavalcante Bandeira, ludos gravan rolon en la editorado de tiu metodo: La informoj de ĝiaj instruistoj liveritaj kaj liverotaj al la editoristoj permesos starigi gvidlinion por aliĝiĝo de la metodo al la merkato. Ĉi rubrike vi povos legi artikolon de Lima Mello pri tiu metodo.

En la kvin lastaj lecionoj estas prezentitaj 500 radikoj. La lernantoj provas skribi leterojn aŭ simplajn tekstojn.

### ĈEFAJ TRAJTOJ DE LA NATURA METODO

Natura - La tuta kurso estas gvidata en Esperanto mem, la lernanto estas konsiderata infano, kiu balbutas la unuajn vortojn;

Struktura - La lernanto lernas la vortojn strukturoj, kaj ne aparte;

Direkta - La grammatiko ne estas io aparta, sed automata; Rapida - Post malmultaj horoj la lernanto parolas la lingvon.

Sendube, aliaj brazilanoj lanĉis diversajn bonajn metodojn, kiel tiujn de Prof. Sylla Chaves, Jair Sales, Paulo Amorim Cardoso, Aloisio Sartorato, Geraldo Mattos, Evaldo Pauli, ktp. Nu, la vario de la metodologioj adoptitaj estas io pozitiva. Mi esperas ke la kuneldonado de mia Natura Metodo de Esperanto, fare de Zamenhof Editores kaj Kultura Esperanta Centro, estu plia pozitivaĵo.

**NATURA METODO DE ESPERANTO**  
Havebla ekde la venonta jaro.

# PEQUENO DICIONÁRIO GRAMATICAL DE ESPERANTO.



## PARA QUEM ESTÁ COMEÇANDO, TÁ DE BOM TAMANHO.

Não, não é uma simples gramática. O Pequeno Dicionário Gramatical, de Gilson Villas Boas, é único no gênero, pois oferece uma vasta gama de verbetes sobre os mais diversos assuntos, dando respostas rápidas às dúvidas do iniciante que surgem durante o seu dia-a-dia. Um verdadeiro "vade-mecum" que, além das vantagens descritas, vem no formato de bolso. Você que está começando simplesmente não pode sair de casa sem ele.

### Zamenhof Editores

**NÚCLEO DE METODOLOGIA  
E DIDÁTICA DO ENSINO DO ESPERANTO**  
Praça Tamandaré, nº 830, S.17 - S.Oeste  
74.110 090 - Goiânia-Go  
(062) 229-1265

### LITERATURO

## FESTO EN ĈIELO

Leopoldo Knoedt

(prima)

- En ĉielo estos festo kaj konkurso pri belart' - tiel sonis manifesto, laŭlegita de Katart'.  
- Ha! kŭak, kŭak  
- kvakis faŭke Vir-Batruk.  
- Estos danco kaj ludado per gitaroj, mandolinoj, -  
- Ha! kŭak, kŭak  
- kvakis faŭke Vir-Bratak'.  
- Ludos Grilo kaj Cikado, venos belaj Batrakinoj  
- Ha! kŭak, kŭak  
- kvakis faŭke Vir-Batruk'.  
- Al la gaja dancofestoj ne por grandbuŝa besto venis el ĉiel' invit' -  
- H...! kvittit-

(sekunda)

Sed testudo ankaŭ volis iri la ĉielan feston; unu kaj alian beston ĝis tediĝo li kaŝolis: lin kunporti en aparto. Troa pezo, jen ekskuzo

ĝenerala por rifuzo.  
En gitaro de Katarto li sin fine ruze kaŝis, kaj trafinte sian celon, el ĝi nevidite pasis. Al la mirdemandoj pri dekiemo kaj kielo de Testudo en ĉielo  
- Ba! mi flugis kiel vi-sonas la respond' bombasta, Kvankam lin neniu kredis, oni al li lokon cedis.  
Ĝis la sanko antaŭlasta li ne ĉesas partopreni, sed subite malaperas, ĉar per sama voj' esperas ree al la Tero veni.  
Li samloke sin instalas, sed, ho ve! dum la veturo la gitara aperturo renversigas kaj ekfalas la kaŝita pasaĝero.  
- Help! - li al Katarto vokas.  
- Flugu do - ĉi tiu mokas, - kiel al ĉiel', al Tero! - Sube staras montspin'; kaj testudo kun fanfarono krias: "Formoviĝu, ŝtono, ke mi ne disrompu vin! - Sed Testudo gruden batas,

evidente kun frakaso ne de l' ŝtono, sed del kiraso. La rompitan ekkompatas Prapatrino de la bestoj: Ŝi kungluas kaj kunflikas ( ĝi pro tio mozaikas) la kirason el la restoj.

(tercia)

Al Nakunda venis same la dezir' al ĉielfesto: tamen nude, senorname, ja ne eblus iri. Vesto pluma mankis de naskiĝo. Per la vastaperta buŝo ploris ŝi en malfelico tiel vee, ke kortuŝo kaptis ĉiujn, tre profunda. Tial ĉiuj donis po unu plumon al Nakunda. Ŝi tre ĝoje iras do kun la aliaj al la festo en ĉielo, senhezite per la multkolora vesto fremdapluma belvestite. Ekde tiam ŝi ĝin vestas ĉiam, sed pri l' plor' rivele vaste disŝirita restas ŝia bus', ĝis postorele.

## BRAZILIO, 90-AJ JAROJ: ONI SERĈAS INTELIGENTAN VIVON

**Por diskutado, la kulturo kaj penso de la triamonda lando**

Paroli pri inteligenteco en lando de 50 milionoj da analfabetoj povas ŝajni stulteco. Sed tio ne estas vero. Ie ajn en la mondo, de la Aziaj Tigroj ĝis Anglio post-Tatcher, traŭrante la ĵus figuritan Komunumon de Sendependa Ŝtatoj (portugale CEI, eks-Sove-tunio), bone formita **Intelligentsia** estas nepre necesa konsisto de ia ajn socia kaj ekonomia aliformiĝo de iu fierigata. Sed la realeco de tiuj landoj, almenaŭ koncerne al la pensformado, estas tre for de la brazila panoramo. "Oni ne kreas pensemajn kapojn sen investi en edukadon", diras Cristóvam Barque, eks-rektoro de Nacia Universitato de Brazilio (portugale UNB).

Dum plejparto de unuamondaj landoj, inkluzive la aziaj tigroj, ne investas malpli ol 4% de siaj malnetaj internaj produktaĵoj (Portugale PIB) en edukadon -

Japanio iras pluen investante 9% - Brazilo ne destinas eĉ 1% de sia PIB por projektoj por edukado. La Programo de Apogo al Scienca kaj Teknologia Disvolviĝo, fermata de brazila registaro asocie kun Monda Banko, ne sukcesas superi la 500 milojn da usonaj dolaroj jare ĉar la registaro mem trovas malfacilaĵojn por enŝpruci monrimedojn. En la Federacia Universitato Rio de Janeiro (portugale UFRJ), la elspezoj pri biblioteko ĉi-jare atingis 3,5 milionojn da usonaj dolaroj. Tio ŝajnas multa, sed ne sufiĉis eĉ por abonado de ĉiuj teknikaj kaj sciencaj publikaĵoj necesaj por aktualigita esplorado.

Aliflanke, la kursoj de postbakalaŭrado, el kie eliras amasoj da pensuloj ĉiujare, saltis de 100 em 1976 al ĉirkaŭ 1.500 en 1992. "La entreprenoj iradis al specialigo kaj la universitatoj enbariĝis kune por provizii tiun neceson", diras Gilberto de Castro, rektoro pri postbakalaŭrado de UFRJ. "La problemo estas tio, ke tiu laboro povus esti multe pli intensa se ni havus pli da mono", aldonas li.

Brazilo elspezas ĉirkaŭ 100 mil usonajn dolarojn por subteni preskaŭ 3 mil stipendiulojn eksterlande ĉiujare. Sed el ĉiu 5, 1 unu laboras eksterlande ĉar la nacia panoramo ne stimulas la revenon. Tio estas, ne sufiĉas esti intelektulo. Devas ekzisti merkato por sorbi tiujn kapojn. "La granda intelektulo de pasinteco estas anstataŭigita de scienca esploristo kaj de kompetenta profesiulo, konkludas Celso Beiziegel, rektoro pri bakalaŭrado de Universitato de SanPaŭlo,

Tamen, ne ĉio estas perdita. Profesoro Aduino Novaes, kiu inter 1988 kaj 1990 okazigis ciklojn de prelegoj kune kun intelektuloj pri la plej diversaj temoj, agnoskas la ekzistadon de bona

nombro da pensuloj eligitaj. - nkorau estas frue por ni kredi, ke estas krizo ene de la brazila intelektularo", diras li. La entrepenisto José Mindlin, mastro de Metal Leve kaj de literatura provizo de ĉirkaŭ 25 mil libroj, konsideras la intelektan pulverigadon kiel mondan fenomenon kaj krome garantias, ke ĉi tie estas pensantaj kapoj. "La Brazilia pensaro adaptiĝas al plurala mondo de nuntempo, sed tute ne elcerpiĝis", garantias li.

La senatano kaj antropologiisto Darcy Ribeiro iras pluen. Lia opinio, estas malmulta estimo de kelkaj intelektuloj al brazilaj aferoj, en "tipa sintenado de koloniitulo, kiu evitas pensi prisia propra lando, tenante okulojn nur por la triamondaj novaĵoj." "Tio estas tiu, kiu instigas senton de sennehaveco". Luis Swarcz, mastro de Companhia das Letras, resumas alimaniere - li pensas laŭ entreprena maniero - la scenejon: "Se la nacio ne havus intelektulojn, mi jam estus bankrotinta".

Sajnas, ke intelektulo, kiu pripensis la landon kiel tutafon cedis spacon al intelektulo, kiu pripensas la sanon de sia lando, la edukadon de sia lando, la ekonomion de sia lando kaj tiel plu. Laŭ la vidmaniero de kelkuloj, tiu ŝanĝo estas pozitiva. "Komence estis intelekta universo limigita kaj paroha, kiu mistifikis la nacian pensamieron", analizas psikologiisto Jurandir Freire Costa. "Nun estas lando eksplikata de ĉiuj", aldonas li. Aliluce estas malpli entuziasmaj, ekzemple de Cristóvam Buarque: "La profesiulo pri pensado estas nuntempe PhD specialigita pri sia kampo, homo okupiĝanta pri paroli nur al siaj paroj, laŝigante for de siaj libroj plejparton de la popolo".

(G.S.J.) El Folha de Sao Paulo. Tradukita de Hilarina Aires

**SALATON!**  
César Dorneles

**JÔ SOARES**

Jô Soares estas sendube unu el la plej talentaj figuroj el la brazilaj televidprogramoj, ĝuste pro tio lia Jô Soares Onze e Meia, ĉe Brazilia Sistema de Televido, la dua plej granda reto de televidstacio en Brazilo, havas kosiderindan kaj fidelan spektantaron, malgraŭ la fakto, ke liaj intervjuoj ne ĉiam estas enhavoriĉaj. En tiuj okazoj la spriteco kaj kompetenteco de Jô "savas" la programon. Krome, Jô ankaŭ stelumas en la semajna revuo VEJA, la plej legata en Brazilo. El lia paĝo en VEJA mi elektis la sekvajn anoncetojn, de "Geedziĝa Agentejo": "Juna eksterlandano,

balbutulo, deziras edziĝi al surda junulino".

"Serioza vidvino 85jaraĝa serĉas viron ankaŭ seriozan, 93jara, nur por interparoli. La resto estos lukro".

"Pigrulo serĉas junulinon jam gravedan".

**EKONOMIKISTOJ**

El "Financial Times": Iu ekonomikisto preterpasanta buĉistejon vidis sur la montrofenestro tri tipojn de ĉerbaĵoj; el bovo, el ŝafo kaj el ekonomikisto. Zorgema pri siaj profesidevoj kaj priatenta pri prezoj, la ekonomikisto fiere konstatas, ke la ĉerbaĵo de ekonomikisto estas la plej multekosta kaj demandas al la buĉisto pri la kialo.

"Simple: estas malfacile trovi ekonomikiston kun ĉerbaĵo", respondis la buĉisto.

**MALBONHUMORO**

La ĵurnalisto kaj verkisto Ruy Castro lanĉis sian trian libron, "O Poder do Mau Humor" (Companhia das Letras, 204 p.) en kiu la spriteco superregas en centoj da kompliktaj famuldeklaroj. Inter ili tiu: "Movadoj kiaj la Etiko en la Politiko estas tiom efikaj kiom estus ekzemple iu movado kiel Estetiko en la Politiko, en kiu oni strebus malinkludi la malbelulojn el la parlamenta vivo" (Carlos Catello Branco). Alia: "Se la registaro aĉetus la cirkon, la nano komencus kreski" (Delfim Neto).

**HODLER**

Frazo de Hector Hodler en la tago en kiu li konstatis, ke sia kolego Edmond Privat ankaŭ interesiĝis pri Esperanto:

- Ah, eĉ vi?!